

# EKSLIBRISO

Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 18-an de majo 2016

La vorto ekslibriso originas el latina EX LIBRIS MEI – el miaj libroj, kaj signifas librosignaĵon aŭ libromarkaĵon (hungare könyvjegy, ĉeĥe knižní značka), kaj spegulas la amon pri libroj de la posedanto, kiu tiel volis marki la libron.

En la antikva epoko, ĉirkaŭ la jaro 1400 antaŭ Kristo, en la biblioteko de faraono AMENOPHOTEP la 3-a oni markis la posedanton per blue emajlitaj keramio-tabuletoj, kiujn oni metis sur la skatoletojn, enhavantaj la papirus-rulaĵojn.

La libro jam komence de la antikva epoko estis konsiderata kiel valora objekto. Ili multfoje estis surĉenitaj al la vendejaj tabloj aŭ al bretoj de la biblioteko.

Antaŭ la malkovro de la presado, kaj ankaŭ nun, la posedanto ofte enskribis sian nomon en la libron, kodekson. Multfoje oni apud la nomo aldonis sentencon, poemeton, kaj humurajn diraĵojn al konatuloj, ke ne forgesu redoni la prunteprenitan libron al la posedanto.

Poste unuj libroamantoj engluis en la libron peceton de paperfolio kun ilia nomo – multfoje la folieto estis ornamita per desegnaĵoj. Tiujn ĉi folietojn ni povas konsideri kiel antaŭaĵojn de la ekslibriso.

La ekslibriso estas peceto de folieto kun gravurita aŭ presita desegnaĵo, multobligita, markante la posedanton. Oni gluas ĝin sur la unuan internan kovrilpaĝon. La ekslibriso ne nur indikas la posedanton, sed ankaŭ ornamas la libron.

Varianto de ekslibriso estas la SUPRALIBROSO, presita aŭ desegnita sur la unuan eksteran kovrilpaĝon. Plej ofte ili prezentas la blazonon de la libroposedanto. Ekzemple en la biblioteko de Matiaso la 1-a (Hunyadi Mátyás 1443-1490), aŭ en la bibliotekoj de riĉaj nobelaj libroamantoj ekzistis tiaj libroj kun supralibroso.

La ekslibriso estas kreita de garfikistoj kaj prezentas belartaĵon, ĝi apartenas al la klaso de etgrafiko. Spite de ĝia malgranda dimensio ĝi povas havi grandan artan valoron.

Ĝi enhavas la nomon de la posedanto, la vortojn „Ex libris”, la simbolan desegnaĵon, kelkfoje frazon, proverbon, aforismon, la signon de la artisto kaj la uzitan tehnikon.

La plej malnova konata ekslibriso estis kreita en Germanio ĉirkaŭ inter jaroj 1470-1480. Ĉi tiu estas ksilografajo de nekonata artisto, prezentanta erinacon. La posedanto estis la kapelano HANS KNABENBERG, havante kromnomon IGLER (Igel signifas erinacon). La ekslibriso enhavas humuran surskribon: DAS DICH EIN IGEL KÜS – KISU VIN UNU ERINACO.

En la mezepoko la kreado de ekslibrisoj rapide evoluis. La unuajn ekslibrisojn pretigis ALBRECHT DÜRER (1471-1528), entute ĉirkaŭ 20. La plej konata estis kreita por sia amiko WILLIBALD PIRCKHEIMER, ksilografajo el 1504 (1518?). La ekslibriso prezentas blazonon, kaj surskribojn: INICIUM SAPIENTIAE TIMOR DOMINI – KOMENCO DE LA SAĜECO ESTAS LA TIMO ANTAŬ LA ETERNULO, alia surskribo: SIBI ET AMICIS – MI KAJ MIAJ AMIKOJ.

La plej konataj artistoj, kiuj kreis ekslibrisojn estis: LUKAS CRANACH (1472-1553), HANS HOLBEIN (1497-1543), FRANÇOIS BOUCHER (1703-1770), FRANS MASEREEL (1889-1972).

La kreado de la moderna ĉeĥa ekslibriso komenciĝas de la jaro 1868, kiam la pentristo JOSEF MÁNES (1820-1871) kreis la ekslibrison por A. LANNA.

Estas konata la ekslibriso el kolekto de brnana bibliofilo WILHELM ALEXANDER BALAUS (1711-1752), kuprogravuraĵo, farita en jaro 1750 de grafikisto MARTIN TYROFF (1704-1758). Dimensioj: 200/145 mm-oj.

Inter ĉeĥaj ekslibriskreantaj artistoj la plej konataj estas JOSEF MÁNES (1820-1871), ALFONS MUCHA (1860-1939), MAX ŠVABINSKÝ (1873-1962), VOJTĚCH PREISSIG (1873-1944), MIKOLÁŠ ALEŠ (1852-1913).

La unua hungara ekslibriso estis kreita en 16-a jarcento por bratislava civitano TEILENKES JÁNOS. Alia plej malnova hungara ekslibriso apartenis al urba biblioteko de BÁRTFA el jaro 1596.

Iamaj hungaraj gravuristoj estis ZELLER SEBESTYÉN, BINDER JÁNOS FÜLÖP (1736-1811), MAYER ÁGOSTON, (1796-1820) NAGY SÁMUEL (1783-1845). Elstara grafikisto estis CZETTER SÁMUEL (1765-1829), kiu kreis unu el plej belaj eŭropaj ekslibrisoj por sinjorino TELEKI SÁMUELNÉ.

Nuntempaj kreantoj de heraldikaj ekslibrisoj estas FERY ANTAL (1909-1994) kaj NAGY ÁRPÁD DÁNIEL (1922-1985).

La enhavo de la ekslibrisoj ŝanĝiĝis de la epoko al epoko kaŭze de ekonomiaj rilatoj, artaj tendencoj. La unuaj ekslibrisoj, se la posedanto estis nobelo aŭ eklezia biblioteko, prezentis blazonojn. Ĉi tiuj nomiĝas heraldikaj ekslibrisoj.

Ĝis la 19-a jarcento la plej ofte kreitaj ekslibrisoj estis la heraldikaj.

Pri la blazonoj kaj iliaj strukturoj okupiĝas la heraldiko, estante la helpa scienco de la historia scienco. La blazono estas emblemo de unu persono, familio, korporacio, kolegio, gildo, urbo kreita laŭ bone difinitaj reguloj.

La emblemo estas konsiderata kiel blazono, se ĝi estas enmetita en ŝildon kaj havas bone difinitajn kolorojn. La blazono konsistas el 4 elementoj: ŝildo kun pentrita figuro, helmo, ornamaĵo de la helmo, kovrilo.

Krome de heraldikaj ekslibrisoj pli poste aperas diversaj temoj, ekzemple bibliotekaj internoj, portretoj, desegnaĵoj rilate al diversaj metioj, simbolaj desegnaĵoj, ornamaj desegnaĵoj kun floroj kaj aliaj, kiuj simbole prezentis la personecon de la libroposedanto, lian ŝatokupon.

Ankaŭ la surskriboj prezentitaj estas interesaj: Voces paginarum - Voĉo de la paĝoj; Sol lucet omnibus – La suno brilas por ĉiuj; Inter folia fructus – Inter folioj estas la fruktoj.

La ekslibriso esprimas trafan desegnaĵon, kiu karakterizas la posedanton, pro tio oni nomis ĝin EPIGRAMO DE LA BELARTAĴO.

La klasifikado de la ekslibrisoj povas okazi laŭ posedanto:

- kiu povas esti individua persono, aŭ
- institucioj, kiel bibliotekoj, lernejoj, universitatoj, asocioj, ktp.

Alia klasifikado estas laŭ temo:

- heraldikaj, prezentantaj blazonojn,
- simbolaj kun diversaj temoj (ornamaj, portretaj, historiaj, familiaj, datrevenaj, ktp.),
- simplaj tekstaj ekslibrisoj.

Oni kutimas klasifikadi ankaŭ laŭ pretigita teĥniko.

La teĥnikoj por krei ekslibrisojn estas variaj. La procezo de farado komenciĝas per desegnado, poste la artisto gravuras la negativon de la desegno en diversajn materialojn (metaloj, ligno, plasta materialo, ŝtono), aŭ povas uzi tipografian metodon. Tiel oni obtenas la matricon (kliŝon) enhavante la negativon de la gravurita desegnaĵo. Ĉi tiu matricio estas uzita por multobligado per mana aŭ maŝina presado.

La uzitan teĥnikon oni povas rekonigi danke al „SIGLO DE BARCELONA” enskribita sur la ekslibrison. Ĉiuj sigloj estas koditaj signoj, kiuj indikas la uzitan teĥnikon al la preparo de la ekslibriso. Ekzemple:

- C<sub>1</sub> – ŝtalgravuraĵo, C<sub>2</sub> – cuprogravuraĵo, C<sub>3</sub> – akvaforto,
- X<sub>1</sub> – lignogravuraĵo, X<sub>2</sub> – ksilografajaĵo, X<sub>3</sub> – linogravuraĵo,
- X<sub>4</sub> – plumbogravuraĵo, L – litografio, P – fotomekanikaj metodoj, ktp.

La ekslibrisoj havas rolon ne nur indiki la posedanton, aŭ beligi la librojn sed ili estas kolekto-objektoj, havante ilian propran vivon.

La ekslibris-kolektantoj estas libroamantoj, bibliofiloj, kiuj ŝanĝas ĉi tiujn etajn artaĵojn inter ili. La ekslibris-kolektantoj grupiĝas en societojn, asociojn, ili renkontiĝas okaze de kongresoj kaj aliaj eventoj. En la jaro 1962 la 9-a Eŭropa Kongreso de Ekslibriso transformiĝis al la 1-a Tutmonda Kongreso de Ekslibriso, FISAE, kie la kolektantoj kaj grafikistoj renkontiĝas po du jaroj. Oni kutimas organizi eĉ ekspoziciojn kun katalogo aŭ konkursojn. Oni eldonas eĉ revuojn. En Ĉeĥa Respubliko ekzistas societo de „Spolek sběratelů a přátel exlibris” (Societo de kolektantoj kaj amikoj de ekslibris), kaj oni eldonas la revuon kun titolo KNIŽNÍ ZNAČKA (Librosignaĵo). Ankaŭ en Hungario kaj Rumanio ekzistas societoj grupante la amikojn de etgrafiko, eldonante iliajn proprajn revuojn: KISGRAFIKA, EX-LIBRISUL ROMÂNESC.

Elstara brnana ekslibris-kolektanto estis MIRKO RIEDL (1920-2013), li sukcesis kolekti 4 700 afiŝojn kaj 17 000 ekslibrisojn. Li donacis sian valoran kolekton al Moravia Galerio de Brno. La ekslibrisoj havas gravan rolon en la historio de libroj, ĉar oni post jarcentoj povas konstati la originon de la ekzempleroj. Ili estas kreitaj de plej elstaraj artistoj, pro tio ili havas signifon ankaŭ por arta historio.

La ekslibriso havas grandan valoron en la disvastigo de ideoj de humaneco, amikeco kaj paco, ĉar ĝi parolas en la internacia lingvo de la arto.

La kreado kaj la kolektado de ekslibriso esprimas la altan aprecadon, estimadon de la libro. Ĉiuj bibliofiloj kaj ekslibris-kolektantoj estas ligitaj sub devizo: „AMOR LIBRORUM NOS UNIT” - „LA AMO DE LA LIBROJ UNUIGAS NIN”.

### **Bibliografio**

- AŬTORA KOLEKTIVO 1981: Romániai magyar irodalmi lexikon. Szépirodalom, közírás, tudományos irodalom, művelődés. I kötet. A-F. 1-a eld. Bukarest. Kriterion Könyvkiadó. 650 p.
- DEÉ NAGY ANIKÓ 2001: A marosvásárhelyi Teleki-Bólyai Könyvtár ex librisei. 1-a eld. Balassi Kiadó Budapest-Polis Könyvkiadó Kolozsvár.
- ENYEDI I.& STIER GY 2009: Nemzeti, egyházi kincsünk – A szatmárnémeti ferencesek könyvtára. 1- eld. Profundis Kiadó.Szatmárnémeti. 246 p.
- GÁBOR DÉNES: Az ex libris múltja, jelene és jövője. KORUNK 1968/6.
- ИВЕНСКИЙ, С.Г. 1980: Книжный знак – история, теория, практика художественного развития. Москва, Книга, 1-a eld., 270 p.
- KERESZTURY DEZSŐ 1981: Híres magyar könyvtárak. RTV-Minerva. Budapest, 138 p.
- SEMSEY ANDOR 1982: Exlibris és heraldika. Kisgrafika. Kisgrafika barátok köre értesítője. 1982/2, 2-4.
- STIER IULIU 1997: Ex-libris. Filigran. Revistă editată de Biblioteca Județeană Satu Mare, anul I, nr 1, 8-9.
- STIER IULIU 2000: Pledo por Esperantista Societo de Ekslibris-Kolektantoj. Bazaro. Esperantlingva revuo. Kluĵo. Rumanio. Jaro IV, Numero 2 (13) 2000, Somero.
- STIER IULIU 1990: Pentru o activitate ex-libristică liberă. Univers Sătmărean 1, nr. 124, 7. august.1990.